


HUNGARA FERVOJISTA MONDO



Esperanto, internacia lingvo



Partoprenantoj de la Landa Amika Fervojista
Esperanto-Renkotiĝo en Vác

3
2013 57-a jarkolekto



HUNGARA FERVOJISTA MONDO

Revuo de la Fervojistia Esperanto-Movado
en Hungario
Fondita de D-ro István Bácskai en la jaro 1957.

Respondeca redaktoro:

István Gulyás

Eldonas:

Hungara Fervojistia Esperanto-Asocio
Hungara Sekcio
de Internacia Fervojistia Esperanto-Federacio
Poŝta adreso: HU-1155 Budapest
Rákos u. 98. I/9.

Aperas kvaronjare

Abonprezo: al hungara adreso: HUF 1500
al eksterlanda adreso: EUR 10

*

MAGYAR VASUTAS VILÁG

A magyar eszperantista vasutasok
központi lapja

Felelős szerkesztő: Gulyás István

Kiadásért felelős:

A Magyar Vasutas Eszperantó Egyesület

Misztótfalusi Nyomdaipari Kft.

Felelős vezető: Soósné Pálfalvai Adrienn

ISSN 0230-323x

ENHAVTABELO

- 2-a kovrilpaĝo: **I. Gulyás: Freŝaj ventoj venas!**
33. **I. Gulyás: La 45-a Landa Amika E-Renkontiĝo**
36. **I. Pethes: Ĝis nun nepublikitaj eventoj**
37. **K. Orosz: Ne-esperantisto por Esperanto**
38. **J. Patay: Neregula libro-prezentado**
39. **La Redakcio: Labori por komuna utilo**
45. **I. Sutka: Altflugaj pensoj**
46. **P. Komlósi: Naturprotektado**
47. **J. Tomísek: El fervoja mondo**

57-a jaro N-ro JULIO - SEPTEMBRO

Freŝaj ventoj venas!

Rapide ŝanĝas la mondo. La politikistoj parolas pri bela kaj feliĉa estonto, la ekonomiistoj promesas ekonomian ekprosperon, la homoj kaj ĉefe la esperantistoj nur atendas kaj esperas. Laŭ mia opinio ne estas sufiĉa nur atendi kaj esperi, ĉar sen konscienca laboro, sen entuziasma agado ne venos pli bona estonto.

En la lasta Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko la komitato de UEA elektis novan estraron. El la sepmembra estraro nur du estraranoj restas en la nova estraro. Preskaŭ ĉiuj novaj estraranoj estas eminentaj esperantistoj, kiuj jam pruvis la kapablojn de la novaj kaj efikaj tendencoj.

Eĉ la nova estraro decidis pri novaj labormetodoj, al kio donos helpon kaj konsilon la starigita 14-membra Konsilio. Do, UEA jam paŝis.

Ankaŭ nia organizo IFEF bezonas renovigon. Se ni analizas la agadon de IFEF, ni devas konstati, ke la labormetodoj en la kadro de la estraro, de la komitato, eĉ de la komisionoj ne estas sufiĉe efikaj.

Eblas, ke ni devas modifi la statuton kaj regularon, la programojn de la kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj. Multaj landaj asocioj de IFEF ĉesis en la lastaj dudek jaroj, kaj multaj ankoraŭ funkciantaj landaj asocioj nur vegetas. La membro-nombro de IFEF sendube rapide malaltiĝas. Mi pensas, ke dum la sekva estrarkunsido la estraranoj trovos iun solvon, kiun ni devos pritrakti en la kadro de la sekva komitatkunsido en la 66-a IFK, kaj IFEF denove progresos.

Kio estas la situacio en nia asocio en Hungario. La hungaraj fervojistaj esperantistoj en Hungario efike agadas. Tamen ni devas konstati, ke mankas la gejunuloj, kaj mankas la financaj cirkonstancoj.

Sen gejunuloj kaj monoj ankaŭ ni ne povas bone kaj longe agadi. La apogo de VOKE preskaŭ ĉesis, kaj el la kotizoj ni ne povos aperigi revuon, ne povos plue solvi niajn taskojn. Kiam venos novaj freŝaj ventoj al nia asocio? Kiam ni povos konstati, ke la hungaraj fervojistaj esperantistoj denove povos efike kaj utile agadi? Mi esperas, ke ni sukcesos trovi la ĝustan vojon, kaj pere de freŝaj ventoj ankaŭ ni renoviĝos!

István Gulyás

LA 45-a LANDA AMIKA FERVOJISTA ESPERANTO – RENKONTIĜO

Inter la 5-a kaj la 7-a de julio 2013 okazis la 45-a Landa Amika Renkontiĝo de la fervojistaj esperantistoj en la urbo Vác. La urbo situas ĉe la maldekstra bordo de la rivero Danubo, 40 km-jn norde de Budapest.



La Instituto de la Surdmutuloj en Vác

La loko de la urbo estis loĝata jam ankaŭ en praaj tempoj, kion prezentas la malkovritaj arkeologiaj trovitaĵoj. En la norda parto de la urbo la arkeologoj malkovris bronzepokan muldejon, kaj en la suda parto oni trovis multajn keltajn kaj havarajn tombojn, eĉ hungarajn tombojn el la epoko de patrujokupado. La konvena trapaŝebleco de la Danubo helpis fariĝi ĉi tiun regionon komerca centro. La urbo rapide evoluis, ĝi iĝis strategie grava loko. Multaj loĝdomoj, preĝejoj, komercaj kaj metiaj industriaj konstruaĵoj estiĝis en la urbo, kiuj ofte detruigis, sed ĉiam rekonstruiĝis. Pro la detruoj de la tataroj kaj turkoj la iamaj romiaj, gotikaj kaj renesancaj konstruaĵoj restis nur en fragmentoj. En la 18-a jarcento post la liberecbatalo la fremd-devenantaj episkopoj komisiis famajn eksterlandajn konstruistojn kaj artistojn por konstrui ĉefe barokajn konstruaĵojn kaj artaĵojn. En tiuj tempoj elformiĝis la komerca centro en la placo „Március 15”, kie gravaj vojoj kruciĝis, kaj oni konstruigis belegajn palacojn, kiel la Instituto de la Surdmutuloj, kie okazis nia Renkontiĝo, la Urbodomo, kiu estas la plej grava memoraĵo de la baroka arkitekturo, la subpreĝejo Sankta Miĥaelo, la iama Grand-preposta Palaco, la Dominikana preĝejo, la Palaco de la Kurio, kaj kelkaj skulptaĵoj, fontano ktp. La placo Konstantino fariĝis eklezia centro de la urbo kun la Katedralo, la Episkopa Palaco, la Piarista

Gimnazio kaj la Ĉeflernejo Apor Vilmos. Multaj aliaj konstruaĵoj (triumfarko, malliberejo, multaj aliaj preĝejoj kaj kapeloj ktp), loĝdomoj, industriaj uzinoj, lernejoj k.a. troveblas en la urbo de 38 miloj da loĝantoj.

La unua hungara fervojlinio ekfunkciis la 15-an de julio 1846 inter Pest kaj Vác, kiun la palatino József kaj lia edzino inaŭguris. Per la unufoja trafikanta trajno - krom la arkiduk-paro - vojaĝis ankaŭ grafo István Széchenyi, Lajos Kossuth, la poeto Sándor Petőfi kaj 250 eminentaj gastoj. La veturtempo daŭris 49 minutojn krom 10 minutoj da halto en stacio Dunakeszi. La lokomotivoj – nomita Buda kaj Pest – ekveturis al Vác je la 3-a horo posttagmeze. La fenestrojn de la vagonoj kovris ledo-kurteno, la dumvesperan malhelon solvis lumigado, la hejtado okazis per boteloj plenigitaj kun varma akvo. La sukceso de la unua fervojo inspiris la poeton Petőfi verki poemon sub titolo „Sur fervojo”.

Oni konstruis la originalan stacidomon en la jaro 1846 laŭ klasika stilo. En 1926 oni trakonstruis ĝin en novbaroka stilo, eĉ nuntempe ĝi montras tiun formon. Apud la



La nova-malnova stacidomo de Vác

stacidomo estas ekspoziciita antikva vaporlokomotivo. Estas interese, ke antaŭ 157 jaroj, kiam la unuaj „fajraj masinoj” trafikis al Vác, la publiko akompanis tiujn kun miraklo kaj timo. Tamen grandega scivolema amaso kolektiĝis la 15-an de marto 1846 ĉe la stacidomo Vác. Samtempe en la urbo Vác giganta incendio detruis, kiu kaŭzis grandan panikon, kaj ĝi malbonigis la solenaĵon. Kelkajn monatojn post la ekfunkciigo de la fervoja trafiko la kontraŭuloj de la „industria

revolucio” planis fari atencon. Ili metis ŝtonojn sur la relojn, sed la vagonaro rompis tiujn.

Por la Amika Renkontiĝo donis lokon la Instituto de la Surdmutuloj, en kiu kaj la programoj kaj la dormeblecoj estis agrablaj.



Promenado apud la Danubo en la urbo Vác

La organizantoj certigis ankoraŭ eblecon tranokti en la gastdomo Althann, kiu ankaŭ troveblas en la centro de la urbo. Jam komence de la renkontiĝo la partoprenantoj spertis la zorgadon de la organizantoj per la akcepto en la stacidomo por la rapida lokigo en la Instituto kaj la gastdomo ktp. En la historio de la Landaj Amikaj Renkontiĝoj nun okazis duafoje, ke la organizantoj ne estis fervojistoj, sed la loka „Danubkurbiĝa Esperanta Grupo”, kiuj kun



Antaŭ la tombo de D-ro Kálmán Kalocsay

granda penado, sed kun malmulta sperto organizis la renkontiĝon. Partoprenis 50 esperantistoj, inter ili tri eksterlandanoj el Aŭstrio kaj Ĉeĥio.

Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj alvenis vendrede, kaj partoprenis en la unua programero de la

renkontiĝo, kiu kondukis nin al la Botanika Ĝardeno de Vácraót. La ĝardenon oni establis en 1827 fare de la familio Géczy. La ĝardenon pliampleksigis kaj grandigis la nova posedanto Sándor Vigyázó, kiu en sia testamento donacis sian enorman havaĵon al la Hungara Scienca Akademio. Post longa jura proceduro, kaj plurfoja ŝanĝo de aliaj posedantoj, finfine en 1951 efektiviĝis la intenco de la herediginto. Tiam fondiĝis Botanika Esplorinstituto kaj multaj kolektaĵoj, kiel la plantosistematika, dendrologia, aranĝeria k.a. Ekde tiam daŭre okazis novaj evoluigoj en la ĝardeno. La riĉa kaj varia flaŭro de la ĝardeno ebligas bonegan vivlokon por diversaj bestoj. El inter la mamuloj nur la ronguloj kaj la insektovaruloj reprezentas sin, ja la ĝardeno estas ĉirkaŭita per muro. 62 birdospecoj estas pruvita en la ĝardeno. Multaj serpentoj, lacertoj, ranoj kaj aliaj moluskoj troveblas tie. Do la partoprenantoj ege ĝuis la viziton.



„Reĝa Palaco” en la urbo Gödöllő

Vendrede vespere okazis bonhumora interkona vespero. Unue la direktoro de la Instituto konigis la historion de la Instituto, la vivovoĵon de la fondinto Andreo Chazar, kaj poste li prezentis la muzeon, kaj mem la Instituton.

Dum la interkona vespero okazis gitara kaj akordiona muziko. Ni aŭdis fabelon kaj poemojn hungarlingve kaj nur kelkajn en Esperanto. Okazis ankaŭ kelkaj ŝercaj scenoj.

Sabate antaŭtagmeze la partoprenantoj faris urborigardon, en kies kadro ili vizitis la Katedralon, la Episkopan Palacon kaj kelkajn malnovajn kontraŭaĵojn. Post la tagmanĝo la partoprenantoj per speciala aŭtobuso kaj per kelkaj privataj aŭtomobiloj vizitis la Kastelon



La organizantoj salutas la partoprenantojn

Grassalkovich en la urbo Gödöllő. Tiun ĉi kastelon komencis konstruigi la grafo Antal Grassalkovich en 1735, kaj post lia morto daŭrigis tion siaj filo kaj nepo. La unika arkitekturo de la konstruaĵo fariĝis modelo por la hungaraj barokaj kasteloj. En 1867 la hungara ŝtato aĉetis kaj rekonstruigis la kastelon, kaj kiel kronadan donacon donacis ĝin al la reĝo Ferenc József la unua, kaj la reĝedzino Elizabeto. La kastelo fariĝis somera rezidejo de la reĝa paro. La reĝa familio precipe printempe kaj aŭtune restadis tie. Ekde la jaro 1920 ĝis la fino de la dua mondmilito la kastelo estis je la dispono de la guberniestro Miklós Horthy kiel somera rezidejo. Ankoraŭ dum la dua mondmilito en 1944 la enmarŝantaj germana kaj soveta armeoj transportis, respektive neniigis la plej parton de la instalaĵo. Nuntempe la kastelo estas ŝtata



Martin Stuppnig el Aŭstrio alparolas

havaĵo. En la ĉefa frunto de la kastelo en 1966 ekfunkciis la permanenta ekspozicio de la Reĝa Kastelmuzeo, la salonego kaj la reĝaj apartamentoj. La instalistoj strebis fidele prezenti la internajn instalaĵojn laŭ la stilo de la monarkotempa Hungario. Okaze de la centjara

jubileo de la morto de la reĝedzino Elizabeto oni aranĝis memorekspozicion.

Bedaŭrinde la planita vizito de la reĝa atendejo de la stacidomo Gödöllő forrestis.

Poste kelkaj partoprenantoj vojaĝis al la tombejo de Máriabesnyő, kie ni florkronadis la tombon de D-ro Kálmán Kalocsay, kiu estas la plej grava kaj famkonata esperantisto ne nur en Hungario, sed en la tuta mondo. Poste ni vizitis la tombon de la grafo Pál Teleki, kiu estis profesoro pri geografio, gvidanto de junulara skolta organizo, eminenta politikisto kaj ĉefministro de Hungario.

Vespere post la abunda vespermanĝo okazis balo. Animagorda muziko kun belsona virina kanto instigis la ĉeestantojn por danci. Okazis kelkaj bonhumoraj spektakloj kaj deklamoj, sed ĉiuj okazis hungarlingve, pro tio la eksterlandaj gastoj ne komprenis, eĉ ne ĝuis tiujn.



Partoprenantoj el Kelebia

Dimanĉe antaŭtagmeze denove okazis promenado en la urbo Vác. En ties kadro la partoprenantoj vizitis la karikatura-ekspozicion de Ferenc Sajdik, poste okazis vizito en la Dominikana Preĝejo, fine la Diocezan Trezorejon vizitis la partoprenantoj.

Pro tiu longa urborigardo por la kunsido, respektive la interparolado pri movadaj aferoj, nur mallonga tempo restis, eĉ tiun gravan programeron ankoraŭ mallongigis la interesa prelego pri la hungaraj fervojoj, fare de Stefan MacGill. Ni ĉiuj ege bedaŭras la perditajn eblecojn por interŝanĝi la opiniojn pri la malbona situacio en la kadro de IFEF, eĉ en la tuta Esperantujo.

Post la komuna tagmanĝo okazis la hejmenveturado. Malgraŭ kelkaj malfacilaĵoj nun mi denove dankas al la organizantoj pro la entuziasma organiza laboro.

István Gulyás

Ĝis nun nepublikitaj eventoj

Antaŭ kelkaj jaroj – kiel kvazaŭ ĉiu samaĝulo – mi konstatis, ke mia laborkapableco regresas, mi fariĝis ĉiam pli laciĝema. Malgraŭ tio mi klopodis konformiĝi al la pretendoj de mi mem kaj de aliuloj. Tamen, mia sanstato intermetiĝis, la kuracistoj ordonis ekhalton pro la infarkto. Dum la hospitala terapio mi trapensis ĉion, mi povas diri, ke mi faris „inventaron”. Venis al mi la fina konkludo, ke mi reduktos mian fizikan agemon je minimuma nivelo, kaj mi priskribos miajn memorojn, travivaĵojn kaj spertojn je la dispono de la legantoj, mi konfidas tiujn por utiligi, aŭ amuziĝi per tio.

Ĉio ĉi, kaj la reeĥoj de kelkaj legantoj instigis min, ke mi kompletigu miajn ĝisnunajn artikolojn, rakontojn per interesaj, specialaj faktoj, travivaĵoj, kiuj kroĉiĝas al la Esperanto-movadaj kongresoj, aranĝaĵoj, eventoj.

Dum libera tempo de la IFEF-kongreso en Helsinki mi ekpromenis sur la ĉefstrato. Mi deziris pli frotunde ekkoni la urbon, ĝian vivon, la tieajn homojn. Memkompreneble mi scivolis kion ofertas la komercistoj kaj la montrofenestroj de la vendejoj. Mi ne volis aĉeti, ja tute ne estis kontentiga mia mon-situacio. Antaŭ la forvojaĝo mia konatulo – pli frue li pasigis iom longan tempon en Finnlando – donacis al mi iom da restaj finnaj markoj; nome t. n. trinkomonon je kelkaj glasoj da biero. Dum la promeno foje mi renkontis fruktovendejon kun eleganta, brila montrofenestro, kaj mi ekvidis kelkajn interesajn specialajn fruktojn, kian antaŭe neniam mi vidis, konis. Inter ili la plej atentokapta estis io grandmezura frukto, similanta je oranĝo, kaj ĝia prezo ŝajnis al mi malmulta. Tuj mi acetis unu, ĉar mi opiniis, ke ĝi estos konvena por kolektiva donaco al mia familio! – La komercisto transdonis kun stranga atentigo: „dumvoje dorlotu ĝin por ke tiu ne vundiĝu”. Dum la hejmen-vojaĝo ĉe la hungara landlimo eĉ la doganistoj kontemplis ĝin. Ankaŭ mia familio akceptis kun granda interesiĝo. Kiam ni dismetis ĝin, mi surpriziĝis, ĉar ne sukcesis dispecigi. Mia menciita konatulo helpis al ni dirante, manĝu kuraĝe, ĝi estas bongusta, ne damaĝas, ĝia nomo estas pomelo (granda citrono, simila al pampelmuso). Nuntempe tiu frukto estas ĉiam pli populara eĉ en Hungario.

En la lasta tago de la 14-a IFEF-kongreso (Budapest, 1962) S-ro Barks, la gvidanto de la angla delegacio alparolis kaj gratulis min pro sukcesa aranĝado de la kongreso kaj deziris pluan rezultohavan agadon en la movado, same bonan sanon. Memkompreneble mi reciprokis la bondezirojn. Post kelkaj momentoj denove li ekparolis, dirante: li petas mian konsenton por tre grava afero. Iom mi surpriziĝis, sed interese atendis lian plian direndaĵon. Li diris, ke la urbo de la sekva IFEF-kongreso, en urbo Stocke-on-Trent vivas la posedanto de porcelan-fabrika. Li estis lerneja

samklasano kaj ili estas bonaj amikoj inter si. Li grave subtenas la lokajn esperantistojn, tial Barks deziras plenumi sekvan tre strangan peton de la amiko, nome inviti iun junan juriston al la kongreso, ĉar ankaŭ la juna bofilo de la fabrikista amiko estas juristo, advokato. La bofilo deziras interŝangi fakajn opiniojn; pro tio li transdonis al mi skriban inviton. Povos esti revizito al Hungario. La amiko kovras ĉion elspezon, nome la dumkongresajn elspezojn, inkluzive tranoktadon, provizadon, kelkajn ekskursojn, interpretiston; same ĉion elspezon de la revizito; nur li bezonas akompananton.

Danke mi akceptis la inviton, kaj ĝoje mi preparis min je la kongreso.

Estis granda ĝojo ekvidi la blankajn rokojn de Dower, la Metroon de Londono, la reĝan palacon, la faman taksion de Londono kaj ceterajn vidindaĵojn. Post la alveno al Londono, relative baldaŭ ni akiris la kongresurbon Stocke-on-Trent, kie mi renkontis miajn plurajn konatajn samideanojn, inter ili akceptis min mia invitito kun sia ĉarma edzino. Post la agrabla interkonatiĝo ili veturigis min al la distrikto de elegantaj vilaoj, pli precize al ilia eleganta trietaĝa loĝdomo.

Ili disponigis al mi bele meblitan gastoĉambro. Post la okupo de mia ĉambro kaj iom refreŝiga lavo ni renkontiĝis en la salono de la loĝdomo por konsumi la anglotradician posttagmezan teumadon; dume ni babiladis pri la temo de nia komuna profesio.

La konoj de mia gastiganto pri la hungara juro estis tute malsimila. Mi promesis al li, kiam li vizitos al Hungario, mi donacos al li diversajn leĝojn kaj faklibrojn por plivastigi liajn konojn.

Post la agrabla teumado kaj konversaciado kune ni foriris al la kongresejo por ĉeesti la programon de la interkona vespero. Jam estis malfrua vespero, preskaŭ nokto, kiam ni reiris hejmen. Mi estis „dorlotita moŝta sinjoro”, per ilia aŭto ili veturigis min al multaj aranĝaĵoj, programoj – tien-reen –, ĉu la edzo ĉu la edzino stiris.

Foje dum vespermanĝo mia gastiganto invitis min al lia sekvataga procedo. Laŭ li la temo estos „treege interesa”. Tre scivoleme mi akompanis lin al la procedo, kies temo estis alimento. Konsterniĝe mi diris al li: bedaŭrinde multaj tiaj kazoj okazas en Hungario. Li miris pri tio, ja laŭ liaj konoj en Hungario regas „libera amo”, pro tio ne ekzistas alimento. Per tiu ĉi evento mia kongresa partopreno paralele estis eĉ informo.

La tempo flugis, la kongreso finiĝis, sekvatage alvenis la momento de la adiaŭo. Ili portis min mobile al la stacidomo. Ni ripetis la konfirmon pri la sekvontjara renkontiĝo en Hungario kaj emocie adiaŭis.

Jes, tiel okazis, la revizito en amika etoso efektiviĝis.

D-ro Imre Pethes

NE-ESPERANTISTO POR ESPERANTO

Antaŭ nelonge dum iu oficiala kunsido de esperantistoj forsonis interesa temo: ĉu ne-esperantistoj faras ion por la Esperanto-movado? La demando ŝajnis stranga, ja la esperantistoj mem estas ĝenerale malkontentaj pri sia propagando de Esperanto – tiukaze ĉu eksteruloj kial, kiel propagandus Esperanton?

Oni devis atendi nelonge, ja mem kronkreta ekzemplo refutis la demandon kaj anoncis sin. Mia amiko, iama kolego informis min, ke la komunumo de sia loĝloko petis lin verki „leksikonon” pri famuloj, eminentuloj de la urbo Vecsés. Kiel neprofesia historiografo li entreprenis tion. Dum lia ekzamena kaj kolekta laboro li renkontiĝis kun la nomo kaj meritoj de Ignác Nagy, li prilaboris kaj envicigis en la leksikonon; samtempe li disponigis tiun materialon al nia Asocio.



Ignác Nagy
(1924 – 2011)

Ignác Nagy estis desegnisto, planista teknikisto. Li naskiĝis la 22-an de novembro 1924 en Csikóstöttös (departemento Tolna); kaj mortis la 19-an de novembro 2011 en sia loĝurbo Vecsés. Li komencis sian profesion kiel bontenada seruristo ĉe la lokomotivejo de urbo Dombóvár. Post la mondmilito en 1947 li transloĝiĝis al urbo Vecsés; kaj li laboris ĉe la „Norda Ĉefriparejo de MÁV”. Komence de la 1950-aj jaroj li finstudis la fervojteknikan mezlernejon, kaj post la abituriento li plulaboris ĉe la Planinstituto de MÁV kiel planista teknikisto, respektive teknika desegnisto. En tiu ĉi laborejo li kontaktiĝis kun fervojistaj esperantistoj kaj alproprigis la lingvon Esperanto. Li korespondadis kun esperantistoj al multaj landoj de la mondo. Pli poste li tradukis fervojfakajn kaj literaturajn verkaĵojn. En 1957 li fariĝis membro de la Hungara Esperanto-Asocio (HEA). Dum la hungarlande aranĝita UEA-kongreso li rezervis tranoktadejon al pola esperantista familio, kiu havis blindan filinon Suzana.

Kompate al tiu knabino, Ignác Nagy tradukis fabelojn, fabel-librojn al Esperanto por blindaj geknaboj, eĉ tiuj spertoj instigis lin prepari specialan brajle-sisteman skribmaŝinon por helpi la blindulojn. Post pluraj provoj li sukcesis efektiviĝi tion. Kun la helpoj de sia familio kaj de la fervoja esperantista juristo, D-ro Mihály Szegedi (1925-2000; la iama vicprezidanto de Hungara Fervojista Esperanto-Asocio) li brajle skribis la plenan poemaron de la hungara poeto Sándor Petőfi. Tiu brajle-skriba volumo aliris multajn landojn de la mondo, kaj de Ĉinio ĝis Anglio, de Usono al Aŭstralio tiuj brajle-sistemaj volumoj fanfaronis la belecon de la hungara lingvo, la trezorejon de la hungara poeto-ĝeniulo. Li edzinigis Éva Győri, ilia geedziĝo en 1953 fruktodonis ĝemelojn István (profesie seruristo) kaj Éva (profesie vartistino). En 1989 la Hungara Esperanto-Asocio distingis lin per „Honorinsigno de HEA” pro lia interpreta laboro.

Károly Orosz

NEREGULA LIBRO-PREZENTADO

Printempe pluraj fervojistaj esperantistoj refoje ricevis afablan invitilon el la urbo Szigethalom por partopreni en grava evento de tiu speciala literatura societo (Szigethy Literatura kaj Artista Rondo), nome tiu aranĝis specialan solenaĵon en la festoĉambro de la urbodomo Szigethalom sub la aŭspicio de la urbestro.

La kialo de la solenaĵo estis neregula libro-prezentado pri la eldono de la III-a volumo, kio laŭvice kaj kronologie prezentas resumigite 60 komunajn eldonaĵojn de *epoko-dokumentoj serio* sub la titolo „Szigethy Leg- Leg- Leg...” kaj „HelenaSzigethy-



Ilona N. Petó (artist-nome „Szigethy Ilona”) redaktis la volumon. Ilona aktivadas en la espero de superiĝo pri ĉiutagaj problemoj, ŝi ĉiam estas malferma por la alturniĝantoj.

La loka urbestro László Fáki partoprenis la solenaĵon. En siaj salutvortoj li citis la sloganon de Ilona, jene: „Prezenti min mem egalas tion, ke mi transdonas la bonon kaj belon el inter miaj pensoj, kaj mian ŝaton de la Naturo – al miaj Familio kaj kunhomoj; per verkaĵo, kreado aŭ buŝe”. Li emfazis la multflankan talentecon de Ilona: ŝi fotadas, verkas

prozaĵon, poemojn ilustritajn kun propraj grafikaĵoj, ŝi aranĝis 71 kolektivajn kaj tri memstarajn ekspoziciojn, verkis 10 volumojn, 8 kolorajn kaj unu nigra-blankan katalogojn. Ŝi havas 320 belartaĵojn, 700 poemajn kaj prozajn volumojn, aranĝis tiujn krom plenumo de sia profesio, nome terapiado de malsano, kaj zorgo pri familio. Ŝi estas aktiva membro de „Landa Asocio de Verkistoj” (AKIOSZ).

La solenaĵo konsistis el tri partoj: la aŭtoroj kaj belartistoj prezentis siajn artaĵojn; la ĉeestantaj artistoj prezentis maksimume tri proprajn artaĵojn; fine la ĉeestantoj prezentis modparadon.

Post la afablaj salutvortoj Ilona N. Petó koncize konigis la esencan enhavon de la tria volumo; sur 36 koloraj paĝoj ŝi prezentas fotojn pri kunvenoj kaj artaĵoj (brodaĵoj, pentraĵoj, manlaboraĵoj, inkrustaĵoj, koloraj krajon-desegnaĵoj kaj grafitajoj, akvareloj, oil- kaj tempera pentraĵoj de artistoj); plue informas pri novaj verkaĵoj de la aŭtoroj (prozoj, poemoj; eĉ inter ili pri tiuj de esperantistoj); konigas vivovoĵojn de aŭtoroj, artistoj.

Foliumante la volumon oni povas legi pri samtempuloj, kiuj elstaris per siaj vivo, laborado, konduto, scio, modesta humaneco; ankaŭ pri tiuj, kiuj jam paŝis al la ombro de la eterneco. La volumo koncize travidigas la aktivadon, aranĝojn, rezultojn de la ĝisnunaj 17 jaroj.

Fine de la oficiala parto de la solenaĵo Ilona N. Petó transdonis al 50 aktivuloj – inter ili al du esperantistoj – memorigan folion sub titolo „Jubilea Honordiplomo II. – 10-jara estas la Szigethy Literatura kaj Artista Rondo”.

La fervojistaj esperantistoj gratulas al Ilona Petó pro ŝia grava kulturagado. Aparte ni dankas ŝian memvolan kunlaboron. Kore ni deziras al ŝi pliajn fortojn, sukcesojn en ŝia kultura agado.

János Patay

LABORI POR KOMUNA UTILO

– FARO REKOMENDAS FARINTON –

Vintre mi grave malsaniĝis, tio rigore devigis min en lito. Kion oni faru en lito? Krom atendi la resaniĝon oni povas stultmiene rigardaĉi la plafonon, sed fari nenion utilan, ĉio ero de mia korpo doloras. La alta febro profundigis min en dormon.

Dum longa tempo malrapide mi pli-bonfartis, malpli mi dormis, sed ankoraŭ ne retiriĝis mia sano, mi ne havis forton por ellitiĝi. Kiam mia amiko vizitis min, li konstatis mian turmentiĝon kaj konsilis al mi pasigi mian maldorman tempon per legado. Hazarde en lia aktuĵo estis la plej nova numero de la revuo Hungara Fervojista Mondo, kaj li proponis pruntedoni al mi.

Kvankam mi ne estas fervojisto, fervojaj temoj, artikoloj ne interesas min, tamen pro la manko de pli bona, mi akceptis kaj metis ĝin sur la apudlitan tableton.

La revuo kuŝis du tagojn sur la tableto, kiam mi eklaciĝis pro la nenifaro, kaj trudite mi prenis la revuon en manon. Trafoliumante tiun mi konstatis, ke mi misopiniis pri la revuo, ĉar ĝiaj artikoloj ne estas sekaj sciencaj, fakaj materioj, ĝi enhavas koloran varianton, ankaŭ ĉiutagajn interesaĵojn.

Inter pluraj interesaj artikoloj pleje kaptis mian atenton iu speciala, kiu havis la titolon „13+1 demandoj”. Mi legis ĝin unufoje, dufoje, kaj ĝia enhavo tre impresis min. Mi prenis la aparaton kaj telefonis al mia amiko, kiu pruntigis la revuon, kaj mi demandis: „ĉu vi havas ĉiun numeron de tiu interesa revuo?” – Mi diris al li ke kiel interesa estas al mi la artikolo „13+1 demandoj”, kaj mi petis pruntigi ĉiujn samtitolajn artikolojn.

Baldaŭ mia amiko denove vizitis min kaj transdonis ĝin kun la vortoj: „Jen la petitaj numeroj, sed nur prunte, mi reatendas tiujn nepre senmanke”. Mi scivoleme komencis legi tiun serion laŭ kronologia ordo.

Dum la seninterrompa legado la unuopaj intervjuoj naskis konsiderindajn ideojn; el kiuj mi kolektis utilan gvidfadenon por agadi en Esperanto-laboro. Kvankam mi ne estas klerigita kritikisto kaj oni ne komisiis min je tio, tamen mi kuraĝas telegramstile komuniki la ĉerpitajn ideojn. – Akceptu bonkore.

La sinjorinon **d-rino Flóra Szabó-Felső** mi kvalifikis por mi: „Majstro de la internacia movado”.

Ŝi donas la konsilon, ke oni ĉiam klopodu fari laŭ siaj ebloj. Estas bezonata de tempo al

tempo refreŝigi la organizan estraron. La „fina venko” de Esperanto apenaŭ venos baldaŭ; per la ĵustaj rimedoj oni povas malrapide antaŭeniri. Oni povas atingi rimarkindajn sukcesojn nur per la koncentro de limigitaj fortoj je konkretaj terenoj. La fervojista movado estas tre utila agado, inter aliaj pri la terminologia laboro kaj pri la regulaj fakaj kontaktoj. La rezultoj de la hungara movado ofte estas prisilentata; same la agado kaj rezultoj de la elstaraj, eminentaj aktivuloj, ja ili estas ekzemplodonaj kaj povas stimuli ceterulojn. La angla lingvo daŭre ne estas la internacia lingvo; tamen sendube pluraj fakoj ne estas kultiveblaj sen la kono de la angla, ĝi tamen ne fariĝis „la” monda lingvo. Se oni volas demokratiigi la internaciajn rilatojn, certe oni trovas la plej konvenan rimedon en Esperanto. La demokratiigo por ni signifas celi situacion, kiam la internaciaj rilatoj estas formataj ne nur de ia elito, sed de la „ĉiutagaj homoj”. Eblas plivastigi la uzon de Esperanto sur la fakaj terenoj, kaj tio estas dezirinda, eĉ dezirenda!

La sinjoron **d-ro István Bácskai** mi taksas: „Majstro de la ideoj, movada organizado”.

Li konsilas, ke oni neniam kaŝu siajn opiniojn. La rezultohava laboro tute ne dependas de la Statutoj. La atendataj ŝanĝoj de la Esperantomovado, la rapida progreso nur tiam realiĝos en nia afero, kiam la elektitaj gvidantoj de la movado kaj la jam ĝenerale kapablaj homoj en la organizaĵo unuvole kunagadas kune kun la bone elektitaj salajritaj funkciuloj. Tre gravas atingi finanĉan bazon, ke la elektitoj senmanke faru ĉion, kion ili kapablas, povas, kaj oni ne imagu siajn poziciojn nur honora! Nepre estas dezirinde zorgeme precizigi la atendeblajn avantaĝojn, aŭ kontraŭajn sekvojn de la decentrigado. „...la venko dependas de tio, kiam la movado estos en tia trankvila stato, ke ĝi povos okupiĝi serioze pri seriozaj aferoj... La historio ne tenas sin al niaj deziroj, dum ni pensas en jaroj, ĝi pensos en jarcentoj... Sed fine kun fantoma certeco ĝi ĉiam trafas la celon, tiun difinas al vi la mondevoluo. Tiu mondevoluo favoras Esperanton!” (Citaĵo de Kálmán Kalocsay.) Per pli bonaj rimedoj la internaciaj organizaĵoj (UEA, SAT, ILEI, ktp.) multe povus plirapidigi la evoluon de Esperanto, se almenaŭ la konkretan alproksimiĝon oni rapidigus al la „celdifinita”. Necesas daŭre doni regulan

kontribuon al la regionaj Esperanto-organizaĵoj utiligeblajn el multaj vidpunktoj. Nepre oni devas organizi fakajn lingvokursojn por la gekolegoj, deĵorantoj sur diversaj laborterenoj de la pasaĝer-trafiko. Konsilindas sisteme organizi seriozajn naciajn konferencojn, simpoziojn, distrajn programojn kaj similajn, kaj Esperanto multflanke estos utiligota. Inter la konataj zorgoj, eĉ problemoj, sendube la unua estas nia enmovada dividiteco. Oni serĉu la troveblajn komunajn elirvojojn, almenaŭ la nepre necesan komunan agadsferon. Ne forigu kaj ne lasu facilanime foriri kapablajn aktivulojn pro iu ajn, ofte bagatelaj kaŭzoj, ja tiu ĉi praktiko pli-malpli kondukas al katastrofo. Modesta bazo estas por la disvastigado de Esperanto, se oni prezentas kiel oni povas utiligi Esperanton por plivigli, plibonigi la kontaktojn kun alilingvanoj – ankaŭ el malproksimaj landoj, eĉ el aliaj mondpartoj – samtiel por pli facile kontaktiĝi en la vigle kreskanta internacia turismo. Oni devas akordigi la agadon al la novaj eblecoj. Ĝenerale oni devas etendi la por- kaj peresperantan laboron al ĉiuj landoj, kie la organizo ankoraŭ ne havas fakan organizaĵon. La plej grava afero estas la partopreno de la junularo en la movado. Devos esti valoraj Esperantaj aranĝaĵoj. HEA en la konsento kun UEA devas okazigi sciencnivelan simpozion pri aktualaj aspektoj de Esperanto. La nova generacio devos eĉ pli rezulte realigi la belegan ideon de Esperanto. La sinjoron **d-ro Imre Ferenczy** mi tenas: „Maistro de la medicina Esperanto-movado kaj radio-amatoroj”. Li konsilas, ke post la alproprigo de la lingvo oni komencu agadi en la movada vivo, laŭeble en sia aĝogrupo. Unue oni estigu buŝan kaj perleteran kontaktojn kun esperantistoj por poluri sian lingvoscion, poste plivastigu tion per samfakuloj por alproprigi fakan lingvoscion. Post certa tempo oni entreprenu porokazajn movadajn taskojn. Akirinte parolkapablon kaj konojn pri la organizaĵo, oni povas plenumi movadan funkcion konforme al sia kapablo. Partopreno movadajn aranĝaĵojn, komence kiel interesiĝanto, poste helpanto, eĉ oganizanto. Post akiro de movadaj spertoj alkroĉiĝu kaj ekagu en fakaj Esperanto-organizaĵoj. Kontaktiĝu kun diversaj enlandaj kaj eksterlandaj E-organizaĵoj kaj ceteraj civilaj organizaĵoj. Oni devas akordigi la kunlaboron inter la hungaraj fakgrupoj kaj tiuj de ceteraj landoj. Oni publikigu artikolojn en diversaj E-revuoj pri movadaj eventoj, pri profesie

siafakaj novaĵoj. Kaptu la eblojn de la vojaĝado, partoprenu en kulturaj kaj fakaj konferencoj, kongresoj; la tie akiritajn konojn kaj spertojn utiligu, apliku en sia propra movada rondo.

La sinjoron **Károly Fajsi** mi kvalifikis por mi: „Maistro de la kolektado”.

Li konsilas, ke post la alproprigo de la lingvo oni komencu legi kaj laŭeble kolekti romanojn, poemarojn, faklibrojn, ĝeneralajn kaj fakajn revuojn. La akiritajn konojn, sciojn oni „ne metu sub grenmezurilon”. Kiu bruligas lumon, tiu uzu ĝin lumigi! Oni disponigu la akiritajn „trezorojn” al siaj samideanoj. La kolektanto ne faru planon, sed serĉu en diversaj katalogoj, bibliografioj, recenzoj de malnovaj gazetoj ĉie la elektitan temaron. Li faru pri ili liston sur slipoj, por ke oni povu aranĝi ilin. Konsideru, ke la kolektada laboro ne estas profitdona negoco, ĝi estas kultura agado! Ne serĉu profiton, ne evitu la oferojn, kaj ne lasu, ke oni deflankigu vin por profitaj celoj! Verdire la maro estas nur gutaro. La gutoj en si mem estas nur gutoj sen signifaj eroj, sed kune ili estas la maro. La unuopaj esperantistoj povas esti elstaraj, eminentaj, grandaj homoj, sed sole restas nur unuopuloj. La komunumo, la unuigo de multaj eroj signifas, reprezentas forton, la potencon. Tial per ĉiuj eblaj fortoj devas klopodi por varbi novajn esperantistojn. Ĉiu devas pligrandigi la amason de adeptoj. Nepre devas kreskigi la nombron de la gutoj por farigi ilin maro. Nur el granda esperantista popolo povas elkreski signifaj fenomenoj sur diversaj teritorioj de la vivo. Tamen oni ne klopodu envicigi eksterajn grandulojn en nian movadon per ĉiuj rimedoj, ilia ĉeesto povas esti utila por la movado, sed tamen la esperantistaro konsistu el esperantistoj! Por tiuj, kiujn oni sukcesis konvinki pri la la utileco kaj bonaj ecoj de Esperanto, ne nur instruu ilin, sed oni helpu ilin perfektigi kaj aliĝi al la organizitaj esperantistoj. La balbutantaj eternaj komencantoj estas ne nur malĝojiga, malesperiga, sed ili multe servas la kontraŭ-propagandon! La estonto de la lingvo kaj tiu de la movado estas en la bona edukota nova generacio. Konvinki ilin oni devas montri bonan ekzemplon. Dankindaj kaj utilaj estas la personaj rilatoj kun multaj esperantistoj kaj hungaroj kaj eksterlandanoj. La „ludo” estas fonto de la ĝojo. Celoj, vojoj, rezultoj ĝojigas kaj entuziasmigas la esperantistaron. Esperantistojn en la Movadon! Oni devas liberiĝi de la profitcentra mondkoncepto! Espereble ankoraŭ troviĝas honestaj, talentaj homoj – flanken lasitaj, eble flanken tiriĝintaj

aŭ flanken puŝitaj! –, kiuj malegoisme akceptos laboron pro la nobla *Celo*; oni devas regajni ilin al la movado. Oni devas esti optimisto.

La sinjorinon **Éva Farkas-Tatár** mi rigardas: „Maĵstro de la instruado, lingvostilo kaj kulturo”.

Kiel oni ĝenerale, ankaŭ la esperantistoj havas diversajn hobiajn (ekskursado, fotado, filatelio, amatora aktorado, muzikado k.c.). Dum la farado de tiuj hobiaj oni akiras travivaĵojn; pri tiuj oni povas prelegi. La plenkreskuloj libervole (ne devige, kiel infanoj) elektas la lernadon de Esperanto, tial li/ŝi ankaŭ restos diligenta kaj fidela. Kompreneble oni devas konstati, ke tamen povas malkreski la entuziasmo kaj la nombro de kursanoj. Ties kaŭzon oni trovas unuavice en la troigaj frazoj de la tiutempa propagando, kiu preskaŭ sen lernado promesis rapidan sukceson. Oni devas pli modeste kaj pli saĝe rekomendi la lernadon de Esperanto. Ĉe la instruado oni devas esti libera kaj ne ligu sin eĉ al la propraj „eminentaj” ideoj. Estas tre utilaj la preparaj aŭ pliperfektigaj kursoj por grupgvidantoj kaj instruistoj/instruantoj. Oni transdonu siajn akiritajn spertojn kaj prenu el ili laŭ sia personeco kaj adaptu tion, kio plaĉas al si. Multaj esperantistoj ne havas la eblecon aboni plurajn Esperantajn gazetojn. Dediĉu certan tempon regule publikigi pri Esperanto-instruado. Regule informu pri la movada agado de esperantistoj. En la kongresoj de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) kaj IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista) donas profundajn travivaĵojn, ja oni povas kune preĝi, kanti, legi la Bibliion en unu komuna lingvo, la partoprenantoj fariĝas gefratoj, kiuj kun malfermitaj koroj proksimiĝas unu al la aliaj. Jam ne nur inter kristanoj oni sentas sin hejmece, sed oni kunlaboras ankaŭ por inter-religiaj renkontiĝoj.

La sinjoron **Alfonz Pechan** mi tenas: „Maĵstro de la Esperanto-movado”.

Li konsilas membriĝi ĉe iu E-grupo; samtempe aliĝi kaj kontinue viziti E-klubojn por praktiki la lingvoscion; plivastigi la E-movadajn konojn; informiĝi pri E-eventoj; aŭskulti ĝeneralajn-fakajn-kulturajn prelegojn; estigi esperantistan amikan rondon; aliĝi al pormovadaj laboroj. Konsilindas fari diversgradajn ekzamenojn, eĉ laŭ interesiga temo la superan en iu speciala fako (ĉiĉeronado, instruado, interpretado k.s.) por ke oni pli precize kaj pli rezulte povu agadi, penadi en la movada laboro. Estas utile

kolekti kaj studadi gvidlibrojn, antologiojn, diverslingvajn terminarojn (je la helpo por laŭbezone krei novajn E-terminojn). Oni ne nur kolektu spertojn multflankajn, sed sukcesas ankaŭ transdoni tiujn! Ne sufiĉas akiri konojn (ĝeneralajn, movadajn, kulturajn, fakajn ktp), sed nepre oni transdonu tiujn al siaj samideanoj, eĉ propagandcele al neesperantistoj, aludante je Esperanto-fonto de tiuj. Kaze de neprecize parolantoj oni ĝentile atentigu lin/ŝin je la gramatika(j) aŭ stila(j) eraroj. Oni multe povas vigligi la Esperanto-movadon per organizado de pluraj lingvokursoj, ekskursoj, kontaktiĝoj. Laŭ sia kapablo, talenteco subtenu la kluban vivon. La kontaktoj ĉiam estu senriproĉaj! Oni tolereme (ne perforte) agitu, konvinku siajn familianojn pri la utileco de Esperanto kaj favorigu ilin por la movada laboro.

La sinjoron **d-ro Árpád Máthé** mi kvalifikis por mi: „Maĵstro de la de planlingvaj periodaĵoj”.

Li tenas grave kaj konsilas, ke oni taksu sin laŭ la faritaĵoj kaj ne laŭ siaj intencoj. Ekde la komenco oni gvidu sin la sekvaj celoj: ricevi fidindajn informojn el diversaj partoj de la mondo, reale informi ĉiujn interesiĝantojn pri fakaj kaj movadaj okazintaĵoj. Estante hungaro, kies lingvon parolas maksimume 15 milionoj, por tiuj celoj oni nepre bezonas Esperanton. Esperanto transformas la pensmanieron. Por inde plenumi la taskon de informito kaj informanto, oni komencu kolekti ĉiun esperantaĵojn, poste librojn kaj ĉefe periodaĵojn. Komencanto ne fabriku poemojn. Komence oni ne redaktu periodaĵon, simple legu ĉiujn, kiun oni akiris aŭ havis. Unuavice oni planu prezenti la multflankan kaj vere internacian trajton de la movado. Estas tre gravaj la agado de individuoj, kluboj, renkontiĝoj kaj regiona kunlaboro. La informojn oni kolektu el multoj de diversaj fontoj, ĉefe el Esperanto-periodaĵoj. Oni ĉiam klopodu publikigi la informojn en originala formo. Se oni akceptis artikolojn, aŭ raportojn, oni ne ŝanĝu la stilon de la aŭtoroj. Krom perrevuaj kaj perleteraj kontaktoj tre utilas ĉiuj renkontiĝoj kun alilandaj esperantistoj, aŭ enlande aŭ eksterlande. Gravaj fontoj estas la prelegoj, raportoj de samideanoj, kiuj vizitis diversajn partojn de la mondo. Oni devas scii la ĝustan tempon por forlasi iun postenon. Post longa „estrarumado” oni devas transdoni la lokon al pli junaj gesamideanoj. La komuna Eŭropo bezonas komunan lingvon, kaj tiu lingvo ne povas esti nacia. Nuntempe plivaloriĝis la individua, klub-nivela agado, pliperfektigo de

la lingvokono, internaciaj kontaktoj. La mensa trezoro de la internacia esperantista komunumo simple ne permesas velki la movadon, oni devas agadi alimaniere kaj lerni, instrui, apliki Esperanton sur diversaj terenoj. Por la diaspora, internacia movado la sola interligilo estas tiuj revuoj, kiuj de tempo al tempo alvenas perpoŝte. La esenco de nia movado estas: solvi la internacian lingvan problemon ne eblas per nacia lingvo. La plifortigo, uzo de la pli ol centjara lingvo Esperanto estas la sola solvo de tiu vere globa kaj vere tre grava problemo. Esperanto havas ne nur rezultoplenan historion, sed ankaŭ prosperan estonton.

La sinjoron **Joachim Giessner** mi vidas: „Maistro de la internacia fervojista movado: ĉiurilate preta kaj bonintenca aganto”.

Oni ĉiam akceptu bonvolajn kaj kapablajn kunlaborantojn, kunestraranojn. Ja nur en komuna agado oni povas pozitive kaj celtrafe labori. Ĉiu movada tasko donas multajn eblecojn por agi laŭ la „interna ideo” de Esperanto, do oni devas praktiki tion, kion Zamenhof volis. Ĉie kie eblas firmigi kontaktojn kun Esperanto-organizoj aŭ aliaj, oni favorigu tion. Necesas multe da personaj energio, ideoj kaj pacienco por gvidi la E-movadon tra tiuj malfacilaĵoj, kiujn oni cetere devas konstati en ĉiuj kulturaj societoj. Malfacile eblas plivastigi la uzon de Esperanto sur la fakaj terenoj, sed nepre necesas. La movado havu pli da bonvolemaj kaj kompetentaj fakuloj inter siaj membroj. La ĝenerala Esperanto-movado disponas multajn kapablulojn, ampleksan spiritan kapitalon kaj neimageblan idealismon. Tiu „kapitalo” ĝustatempe kaj ĝustaloke estu saĝe mobilizata, tiam la evoluo de la movado povos esti pozitive influata. Sed pacienco nepre necesos. Ĉiu gvidanto de la E-movado tenu al si tasko por disponigi siajn spertojn laŭforte al Esperanto. Ĉiuj multflankaj taskoj kaŭzas daŭran okupadon, penadon, sed la rezultoj donas same daŭran ĝojon kaj ĝojo estas fonto de energio.

La sinjoron **Oszkár Princz** mi tenas: „Maistro de la fakaj laboroj kaj faktotumo”.

Dum la movada agado oni devas aktuale respondi la celojn priskribitajn de Zamenhof: „Sur neŭtrala lingva fundamento: a) komprenante unu la alian, b) la popoloj faros en konsento, c) unu grandan rondon familian.”, aŭ agadi por „ideo de enkonduko de komuna lingvo por la komunikiĝoj inter diversaj popoloj.” (L. Zamenhof: Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia). La Esperanto-movada estraro (de la plej

malsupra ĝis la plej supera ĉiu-nivele) prilaboru strategion, kaj konforme al ĝi realigeblan laborplanon por la valida mandat-periodo. Ĉiuj estraranoj memstare laboru sur sia tereno kaj kolektu kunlaborantojn por realigi la planitajn taskojn. En la laborplano estu pluraj konkretaj taskoj, kies plenumojn oni povos regule kontroli. La fakaj asocioj havu minimume cent membrojn, laŭeble havu fakan revuon, fakajn konferencojn, havu kontaktojn kun neesperantistaj fakaj organizoj. Por gvidi asocion, organizan unuon, oni bezonas koheran strategion kaj gvidlinion. La organizaĵo kaj ĝiaj unuoj difinu tiujn agadojn, kiuj celas produkti valorojn dum difinitiva tempo. Krei ŝancon por la plivastigo de Esperanto, lingvo internacia povos esti, se la lingvo estos pli kaj pli uzebla en la praktiko, oni devas prezenti la praktikajn uzeblecojn de Esperanto, kiel la fervojaj horarlibroj, telefonlibroj, turismaj informiloj en Esperanto k.t.p. Samtempe oni prezentu Esperanton, kiel rimedon de egalrajta komunikado al tiuj internaciaj organizoj, kiuj deklaras en siaj statutoj egalrajtecon de lingvoj (UNO, UNESCO ktp.). La esperantistoj klopodu ĉiam pli multe uzi Esperanton en la libertempaj kaj profesiaj kontaktoj. Krom la ĝeneralaj vortaroj estas bezonataj ankaŭ fakaj vortaroj. Sen ili larĝskale ne eblas kultivi Esperanton. Sekve ne eblas varbi tiujn homojn, kiujn interesas la praktika valoro de la internacia lingvo. Estas konsilinde la kvalita evoluigo de fakaj asocioj; kiel konkretaj taskoj ekzemple la kompilado de fakaj vortaroj por tiuj, kiuj jam ĝin havas, ĝia perfektigo kaj ampleksigo. Helpe de fakaj vortaroj oni povus traduki fakan literaturon el la t.n. bazaj verkoj, kiuj poste povus formi enciklopedieton. En la epoko de komputiloj oni povas transsalti la libroformon de faklibroj (ankaŭ pro manko de sufiĉaj financoj) kaj prezenti ilin sur diskoj. Oni ne forgesu pri la korespondado de samfakuloj, ja perletere oni povas akiri verajn informojn. Oni estigu kontaktojn kun neesperantistaj fakaj asocioj por prezenti la praktikajn avantaĝojn de Esperanto. La lernado de Esperanto disvastiĝos nur tiam, se montriĝos pli da motivoj lerni ĝin. Oni certe uzu Esperanton sur tiuj kampoj, kie Esperanto jam „venkis”. La movado vere donu tion, kion ĝi promesas: estu nia movado bone organizita socia organizaĵo. Funkciu tiuj bazaj servoj, pri kiuj ni fieras: ekzemple kiu ŝatus, tiu vere povu korespondi; kiu ŝatus lerni la lingvon, tiu povu lerni ĝin samnivele kiel la aliajn lingvojn; plivastiĝu la servoj kiel ekzemple lingvoservo, Pasporta Servo, kaj ĝia adresaro ĉiam estu

akirebla; ankaŭ iuj trovu lokon en la mondo, kiuj ne volas „batali por la venko”, sed nur simple ŝatus uzi ĝian pretajn servojn pagante ties kostojn (kun profito). Oni modifu la sintenon de multegaj esperantistoj, kiuj volas ĉiam konvinki la superajn instancojn, naciajn kaj internaciajn organizaĵojn, ke ili enkonduku Esperanton. La esperantistoj provu kontaktigi unue esperantistojn en tiuj laborejoj, kie la firmao, instanco havas kontaktojn fakajn, sociajn, kulturajn aŭ sportajn, kaj post ili komune povus proponi konkretan uzon de la lingvo Esperanto. Oni devas agadi por fortigi la praktikan uzadon de Esperanto. Oni fortigu la disvastigadon de Esperanto, fortigu la praktikan uzeblecon de la lingvo sur la terenoj de la kultura vivo, faka tereno, turismo.

La sinjoron **Heinz Schindler** mi vidas: „*Maistro de la subtenado*”.

Estas konsilinde viziti internaciajn kongresojn, akiri esperantistajn geamikojn kaj estigi gefratajn kontaktojn, per kiuj oni povas plifaciligi eksterlandajn rondvojaĝojn, ekkoni diversajn popolojn, iliajn kulturojn, vivmanierojn, esperantistajn agadojn, krei esperanto-rilatajn kontaktojn; kolekti riĉajn travivaĵojn, prefere malproksime en malriĉaj landoj. Estas grave, ke spertaj esperantistoj dum kongresoj pacience parolu kun komencantoj, kiuj unufoje kun espero kaj revoj partoprenos kongreson, kvankam ne ĉiu aktivulo povas akcepti pluajn korespondantojn. Oni devas plifortigi la Esperanto-movadon per malhelpo de perdoj. Anstataŭ la elspezoj de damaĝaj hobiaj (luksaĵoj, alkoholo, fumado, aĉetado de superfluaĵoj, fi-amuzaĵoj ktp.) per financaj rimedoj oni subtenu Esperanto-organizaĵojn, la eldonadon de Esperanto-libroj kaj Esperanto-revuoj, lingvo-instruado. Invitu kaj en propra hejmo gastigu aktivajn kaj junajn esperantistojn el malriĉaj landoj je propra kosto. – Multe valora estas la ĝojo, kion oni povas fari kun siaj rimedoj (per donacoj, subtenoj, invitoj kaj gastigoj) kaj doni al siaj gastoj, al Esperanto-organizaĵoj.

La sinjoron **d-ro Imre Pethes** mi kvalifikis por mi: „*Maistro de la pacmovado*”.

Ĉiam honeste kaj entuziasme oni strebu plenumi siajn ĉiurilatajn taskojn. Post kiam ekkreskos la kultura deziro, same ekkreskos la interesiĝo pri Esperanto. Por bone funkciigi la asocion, estas bezonata krei kaj bontenadi statuton kaj funkciajn regularon, kiuj precize priskribas la funkciajn kondiĉojn, fiksas la celojn, la formon de la funkcio, la taskojn, rajtojn kaj devojn de la membraro, la agadosferon kaj kompetentecon de la

estraranoj. La plej grava estas determini la validigan principon de rajtoj kaj devoj. La devizo de la Mondpaca Esperantista-Movado (MEM) – „Per Esperanto por la paco” – esprimas tiun eblon de la interacia lingvo, ke ĝia uzado helpas la bontenadon de la paco, la disvastigon de la pacmovado. Kiel celo de la Esperanto estas paco, la evoluigo de kontaktoj inter homoj estas pruvita kaj vera, la esperantistoj ne hazarde kunlaboris ĉe la fondo de la pacmovado dum la jaroj de la „malvarma milito”; ja Zamenhof mem tiucele kreis la lingvon, ke anstataŭ la antagonismo de la plurlingveco regu la paco. La pacmovado ĉiam levis voĉon favore al la paco kaj disvastigis la gravecon de la interkompreniĝo, paca kunvivo inter la homoj. Ĉiu esperantisto tenu al si grava tasko por efektiviĝi, plifortigi la kunlaboron kun ĉiu socia organizaĵo. Por esti esperantisto, la plej grava tasko estas kreskigi la pretendon por uzi la internacian lingvon je la faka utiligo, informi pri la faka evoluado por akiri tiun, kreskigi la nombron de la Esperanto-parolantoj sur la faka tereno. Pro tio estas bezonata konigi la ekonomiajn kaj politikajn gvidantojn pri la lingvo kaj movado laŭ la pretendoj de enlandaj kaj eksterlandaj grupoj, organizoj, unuopaj esperantistoj. La organizaĵoj aperigu broŝurojn, artikolojn en la lingvo de la koncernaj landoj kaj en la tielnomata „internacia lingvo angla”, kiuj pruvas la taŭgan uzeblecon de la lingvo Esperanto. Krom la ambaŭflanka tolero kun ĉiu kaj kun fakaj organizoj estus bezonata la daŭrigo de la ekvilibrigita dialogo. Ĉiu esperantisto helpu, kontribuu al la pac-movado kaj Esperantomovado.

La sinjoron **János Patay** mi kvalifikas por mi: „*Maistro de la registrado, administrado*”.

La estraro de la organizaĵo jam komence komisiu la novajn membrojn por efektiviĝi bagatelajn taskojn. La komisiito observu ĉion kun akraj okuloj-oreloj-atentemo. Ĉiam oni strebu precize plenumi la ricevitajn taskojn. La komisiito precize efektiviĝu la komision, ja tio portos rezulton. La aktivulo senescepte preparu sin je ĉiu tasko. Multe kontribuas al la lingvoscio, se oni verkas artikolojn por revuoj; kaj la koncernaj lektoroj pritraktas kun li/ŝi la gramatikajn/stilajn erarojn. Ĉiu movada laboro (parolo, legado, prezentado, verkado, ĉiĉeronado, konsultado, partopreno en aranĝaĵoj, konferencoj, kongresoj) precizigas la lingvoscion ne nur por la aktivulo, sed ĝenerale al ĉiu. La aktivulo konsideru, „kiu plantas kaj kiu akvumas, ili kune laboras por la sama celo, eble aliulo rikoltos; sed ĉiu

ricevos sian gratifikon pro sia streĉa laboro". Oni ne forgesu: li/ŝi estas nur eta ĉenero de granda ĉenaro (en la movada laboro). La aktivulo faru memrevizion por fari konkludojn, por pliprecizigi sian estontan laboron. Oni faru kion scias, kion kapablas. La gvidantoj de la organizaĵo ĝustatempe zorgu pri la klerigo de la movadaj posteuloj. La gvidantoj de la organizo aranĝu perfektigajn kursojn por pliprecizigi la movadan laboron, funkciigu viglan kaj valoran klubvivon, fakajn kontaktojn kun aliaj fakgrupoj kaj enlande kaj eksterlande, serĉu kaj reinvitu la malaperintajn sed ankoraŭ vivantajn esperantistojn al la movado; flegu kaj porokaze honorsalutu la movadajn memorlokojn (memortabulojn, monumentojn, tombojn de pioniroj). Estas tre grava tasko de la gvidantoj kolekti, registri kaj konservi la movadajn datumojn pri ĉiuj organizaj, movadaj, kulturaj, historiaj eventoj, pioniroj. Oni tenu antaŭ siaj okuloj: „ĉiu plano valoras tiom, kiom oni realigas el ĝi!”

Mi proponas daŭrigi la serion pri la Esperanto-movada labor-metodo de elstaraj aktivuloj. Farigu utilajn esperantistojn!

Kompilis:

„Anonima eksmembro de la Hungaria Esperanto-Asocio”

La redakcio akceptis la instigon de la aŭtoro kaj ekde tiam jam aperis tri pluaj intervjuoj. Intertempe la aŭtoro mortis, pro tio la redakcio kompletigis lian ideon, nome la t. n. „gvidfadenon”;
– jene:

Oni povas kvalifiki sinjoron **Gábor Pál:**
„Maĵstro de la publika klerigado”.

En la Esperanto-movado ne sufiĉas penadi nur por la movada laboro, krome estas pluraj ceteraj taskoj (ekz. lingvo-instruado, flegado de la faka terminaro, kontaktoj kun ceteraj enlandaj kaj eksterlandaj E-movadaj organizaĵoj, turismo, kultura klerigado, k.c.). Gábor Pál montras abundan ideon pri la kultura penado. Kvankam li ne regas nian internacian lingvon (li estas „nur” simpatianto de Esperanto), tamen li multe kontribuis al la disvastigo de la hungara kulturo per prezentado de multflankaj artaj branĉoj (ekz. muzika artaĵo, amatoraj pentroarto kaj skulptado, radio-amatorado, ekspozicioj de artaĵoj ktp.) en diversaj enlandaj kaj internaciaj kongresoj, konferencoj resp. renkontiĝoj; eĉ li ne nur demonstras per tiuj, sed kuraĝigas la esperantistojn. Li instigas la esperantistojn al kultura laboro laŭ la eminenta devizo de FISAIC (Fédération

Internationale des Sociétés Artistiques et Intellectuelles de Cheminots – Internacia Fervoĵista Libertempa Kultura kaj Intelekta Asocio) „Amikeco sen limoj”. Li instigas la fervoĵistan esperantistaron kreskigi la nivelon de la fervoĵista kulturo, kaj per tio disvastigi la fervoĵistan Esperanto-movadon.

Oni povas kvalifiki sinjoron **István Gulyás:**
„Maĵstro de la multflanka movada penado”.

En siaj privata, faka, movada vivo (de 65 jaroj!) István Gulyás ĉiam estis/estas severa, konsekvenca, tamen humana homo. Li havas bonan memorkapablon (pri datoj, sumoj, detaloj de kontraktoj, ĉiurilataj eventoj), li ĉiam estas preta por traktadi, eĉ per anticipa sinprepariĝo. Ĉiam efike li laboris/as kaj en la landa kaj en la internacia fakaj laboroj, same en la Esperanto-movada agado. Li plenumis gravajn taskojn en la internaciaj fakaj laboroj (UIC, FISAIC) kaj en la Esperanto-movado (komitatano de IFEF, komitatano de UEA por IFEF, vicprezidanto de IFEF, membro de la Terminara Komisiono de IFEF, LKK-prezidanto de kvar IFK-oj en Hungario, aŭtoro de multaj fakaj prelegoj kaj sennombraj fakaj, kulturaj, resp. E-movadaj, E-historiaj artikoloj, organizanto de pluraj IFEF-estrarkunsidoj). Laŭ siaj movadaj postenoj li travojaĝis preskaŭ la tutan mondon, kaj akirinta multajn spertojn, li utiligis tiujn en sia agado; same ĉe la enlanda aktivado (gvidanto de E-lingvokursoj, membro de la komisiono de faka terminaro, estrarano de la Centra Fervoĵista Fakgrupo, vicprezidanto, pli poste prezidanto de la Hungara Fervoĵista sekcio de HEA, eĉ ankaŭ en ĝia laŭjura posta organizaĵo Hungara Fervoĵista Esperanto-Asocio, responda eldoninto, pli poste redaktoro de la revuo Hungara Fervoĵista Mondo, ekde 2010 la gvidanto de la Redaktora Komisiono de IFEF). Do, li estis/as motoroj de landa kaj internacia E-organizaĵoj. Li ĉiam estis/as preta por doni frapajn konsilojn al la turniĝantoj al li. – Kiel talenta, eminenta, multajn spertojn akirinta esperantisto li konsilas al la esperantistaro: senlace kaj entuziasme agadi por Esperanto; serĉi kaj varbi novajn membrojn, precipe gejunulojn; organizi allogajn programojn; seninterrompe kaj regule organizi renkontiĝojn, enlande Landan Amikan Fervoĵistan Renkontiĝon; plivastigi la klubkunvenojn kun interesaj kaj variaj programoj; regule eldoni la fakajn revuojn (HFM, IF); kunlabori kun aliaj fakaj organizoj kaj kun instancoj kaj aŭtoritatoj; plibonigi la informadon pri E-movado; organizi bazgradajn kaj progresigajn lingvokursojn; plivastigi efikan propagandon pri Esperanto.

Oni povas kvalifiki sinjoron **d-ro Romano Bolognesi**: „*Majstro de la internacia laboro*”. Per liaj vivo kaj kariero li prezentas, ke en la Esperanto-movado ne estas disigeblaj la faka laboro kaj la movada penado. Sur ambaŭ vojoj la plej grava estas komenci la aktivadon ĉe la „plej malalta ŝtupo”, ja nur tiamaniere oni povas akiri parte la konojn, aliparte kunlaborantojn. Oni devas meti la duan ŝtupon unu post la alia, tielmaniere „konstrui” la „precizan vojon” por disvastigi la movadon. Unuaranga tasko estas la lingvo-instruado, pliperfektigo en la lingvoscio. Estas grava metodo, ke oni akiru eksterajn subtenantojn ne laŭ „bonparenceco”, sed per anticipa agito kaj konvinko pri la nobla ideo kaj celo de Esperanto. Per tio oni povas mildigi kaj glatigi eventualajn kontrastojn kaj favorigi efektivan kunlaboron. Li tenas grava afero pasie kaj

persiste labori. Tiun ĉi konstaton fortigas tiu vasta kono sur la tereno de kulturo, historio kaj lingvistiko, kiujn li altgrade faras krom Esperanto. La gvidantoj – kaj ĝenerale la membraro – devas adapti la evoluon al la kreskantaj postuloj. Tion akcelas la regula eldonado de informoj pri diverstipaj temoj (sciencoj, lingvoj, kuriozaĵoj, literaturo, kulturo), por ke tiuj estu vaste konataj; kaj tiel la revuoj pluvivu. Oni devas konsideri la elektronikan ekspedadon, ja tiu metodo estas tre rapida kaj pli malmulte kosta ol la tradicia. Estas grave konservadi, daŭre flegi, bontenadi la movadan historion. Fine, ĉiu gvidanto kaj membro de Esperanto-movado estu modesta, ne „ĉasadu” honorojn, gloron, antaŭ iliaj okuloj ĉiam ŝvebu la efektivigo de la „Zamenhofa Ideo”.

Daŭrigis: **La Redakcio**

Altflugaj pensoj pri la maljuniĝo

Foje mia juna amikino demandis min: kia sento estas maljuniĝi? Mi konsterniĝis pri ŝia demando, ja mi neniam sentis, ke mi estus maljuna. Vidante mian reagon sur mia vizaĝo, la junulino tuj puŝiĝis en embarason; sed mi klarigis al ŝi, ke ĝi estas interesa demando por mi, mi pensiĝos pri tio, kaj pli poste mi respondos.

Fine mi decidis, ke la maljuniĝo estas donaco. Ĝustadire en mia vivo unuafoje nun povas esti tio, kio mi ĉiam volis esti; ja ne mia korpo! Foje-foje eĉ mi ĉagrenis pro la faltoj, pufiĝintaj okuloj, dikigintaj pluteoj. Ofte mi konsterniĝas tiun maljunan virinon, kiu rerigardas al mi per la spegulo, kiu ĝuste tiel ŝajnas, kiel mia patrino; sed mi nelonge turmentiĝas pro tio.

Mi neniam ŝanĝus mian grandstilan vivon, miajn amantan familion, mirindajn geamikojn kontraŭ malpli griza hararo, aŭ kontraŭ malvasta ventro.

Kiel mi fariĝis pli multjarulo, ĉiam mi fariĝis malpli kritikema pri mi. Mi fariĝis mia propra amiko. Mi ne kritikis min, se mi konsumas pli multe da kukaĵo ol estus bezonata, aŭ se mi ne rekovras la liton, aŭ se mi aĉetas tiun flurujon por la balkono, kiun mi opinias nebezonata, sed ĝi aspektas bone.

Mi sentas min rajtigita por ĝui la vivon, por ke mi estu senorda, aŭ ekstravaganculo. Multfoje mi travivis, ke miaj plej intimaj geamikoj mortis pli frue, ol ili estus ĝisvivintaj tiun liberon, kiun la maljuneco portas kun si mem. Kiu zorgas pri tio, ke frumatene ĝis la kvara horo mi legas, aŭ mi ludas per komputilo? Laŭ mia gusto kaj plaĉo mi povas danci je malnovmoda melodio; kaj mi povas plori je la memoro de iama amoro..., eĉ mi faras.

Mi promenas sur marbordo vestita en tia bankostumo, en kiu miaj korpopartoj ŝvelformiĝas, kaj mi sinforgese ĵetas min en la ondojn, kaj mi ne zorgas pri la bedaŭriĝantaj ekrigardoj de homoj, ja eĉ ili maljuniĝos.

Memkompreneble mi scias eĉ tion, ke foje-foje mi estas forgesema. Kelkfoje eĉ ekzistas forgesi ion el la vivo. Tamen mi memoras pri la plej gravaj aferoj.

Jes, en mia vivo kelkfoje disrompiĝis mia koro. Kial ĝi ne disrompiĝintus, kiam iu mortas kiun mi amis; kiam infano suferas, aŭ aŭto surveturas mian ŝatatan katon? Tamen, la disrompiĝinta koro estas tio, kio donas forton, komprenon kaj kompatigas. Tia koro, kio neniam suferis kaj restis sensenta al ĉio, tio neniam sentos ĝojon pri la malperfekteco.

Mi estas tre feliĉa, por ke mi longe vivis por fariĝi grizharulo, kaj mia juneca ridado gravuris profundajn faltojn sur mian vizaĝon. Multaj estas kiuj neniam ridis, kaj kiuj ne ĝisvivis havi grizajn haretojn.

Kiel forpasas la jaroj, oni des pli facile fariĝas pozitiva. Oni devas ĉiam malpli zorgi pri tio, kion aliuloj pensas. Eĉ mi ne starigas demandojn al mi; aldone mi rezervas al mi la rajton, ke mi ne pravu.

Nu, respondante je la demando de mia juna amikino mi povas deklari, ke mi ne bedaŭras mian

maljuniĝon, ĝi faras min libera. Mi ŝatas tion kiu mi estiĝis. Mi ne volas eterne vivi, sed ĝis kiam mi vivas, ne malŝparas facilanime mian tempon, mi ne faras al mi afliktojn. Preskaŭ ĉiutage mi konsumas dolĉaĵon, se mi sopiras.

Jen bona konsilo: ĉiam ridetu, tre rigore konservu la – el vera koro devenantajn – amikecojn! Mi kore konsilas la suprajn pensojn al miaj kunuloj kaj miaj morbo-kunuloj. Mi proponas, ĉiam priridu viajn stultecon, ja la ridado estas la plej valora donaco de la vivo, ĝi firmigas la imuniĝon.

Notis: **István Sutka**

NATURPROTEKTADO

Festotago de birdoj kaj arboj

En la jaro 1902 la landoj de Eŭropo interkonsentis en Parizo protekti la utilajn birdojn kaj arbojn. Laŭ la 1906-jara leĝartikolo n-ro I. en majo de ĉiu jaro la lernejoj dediĉu unu tagon de majo por konigi la utilajn birdojn kaj arbojn.

Unuafoje en la mondo la ornitologo István Chernel organizis tiun en 1902. Laŭ la natruprotekta leĝo § 64 (3): „Ĉiujare la 10-a de majo estu 'Festotago de birdoj kaj arboj', la loĝantaro – precipe la junularo – dediĉu sian engaĝiĝon je la protektado de la naturo. La defendado de la utilaj birdoj komenciĝas per iliaj manĝigo kaj obeservo.

Al tiu temo kroĉiĝas mia travivaĵo.

Ĝenerale ĉiukaze mi haltas antaŭ la mondtrofenestro de librovendejo. Foje mi ekvidis malgrandan libreton kun titolo: „Kial kantas la najtingalo?”

Stulta demando – mi opiniis. Kial kuras la leporo? La azeno kial havas longajn orelojn? – Tamen mi aĉetis tiun libreton, ja ne estis multekosta. Mi tre ĝojas por ke mi aĉetis.

La aŭtoro de la libreto estis ornitologo, kaj observis, ke la najtingal-paĉjoj (nur la maskloj kantas) tage-nokte kantas, kiam la idoj

eloviĝas. Tio maltrankviligis la scienculon: kial kantas tage-nokte, kial ne sufiĉas nur tage?

Li kaptis tri idojn el inter la maskloj, portis ilin en sian loĝejon kaj nutris ilin. Post tri semajnoj li remetis ilin en ĝian neston.

Pasis la tempo, kiam alvenis la tempo de la elflugado, la idoj fariĝis seks-maturaj. Sed tiu tri, al kiuj mankis la „patraj tri semajnoj”, ili povis nur kriĉi, kaj la najtingalinoj rifuĝis.

En ta situacio ne ekzistas geedzeco, ne ekzistas nesto, ne ekzistas daŭrigo; ĉar la stulta birdo (ja ĝi havas etan kapon, en ĝi etan cerbon) ĝi scias, ke havas ses semajnojn por „enkanti” la bezonatan melodion por ke estu daŭrigo.

En la manoj almenaŭ 18 jarojn ĉeestas viaj infanoj. Kion vi scias „enkanti” en ilian koron? Ĉu vi „enkantis” la melodion? Senpaŭze oni devus kanti ĝis kompleta elĉerpiĝo; poste oni povas delasi viajn idojn (geinfanojn). Estos geedziĝoj, estos nova nesto. Povos veni novaj generacioj, estos daŭrigo.

Kompilis: **Péter Komlósi**


EL FERVOJA MONDO

Aŭstrio: **ÖBB** aĉetos novajn veturilojn

La kontrola aŭtoritato de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj **ÖBB** aprobis firman mendon por aĉeti 100 elektrajn kelkvagonajn veturilkombinaĵojn *Siemens Desiro ML*. Kontrakto havas valoron de 550 milionojn da Eŭroj. Trivagonaj veturilkombinaĵoj por rapido 160 km/h estos liverataj ĝis fino de 2015. La mendilo inkluzivas 30 kombinaĵojn por denseca amaŝtransporto sur reto *S-Bahn* en Vieno. La veturilkombinaĵoj havos po 244 sidlokoj, kaj por rapida eltrajniĝo estos provizitaj po ses pordoj en ambaŭ flankoj. Pliaj 70 veturilkombinaĵoj prezentos regionan modifon kun po 259 sidlokoj kaj po kvar pordoj en ĉiu flanko, 35 estos ekspluatataj en Malsupra Aŭstrio, 18 en Stirio kaj 17 en Supra Aŭstrio.

Britio: **Elektrizado de fervojlinioj en Britio**

En Britio estas elektrizitaj malpli ol 40 procentoj de la fervojaj linioj. Preskaŭ du trionoj de la elektrizitaj linioj estas kurentoprovizataj de elektotensio 660 aŭ 750 V, kaj energio estas distribuata helpe de flanka relo. Tiu ĉi sistemo estas konvena prefere por malpezaj pasaĝertrajnoj kaj limigita por rapidoj ĉirkaŭ 100 mejloj en horo. Pro tio sur pli gravaj linioj estas instalataj pli konvena alternkurenta sistemo 25 kV/50 Hz, kiuj proporcie estas malmulte elektrizitaj. Ekde jaro 2016 estos elektrizita linio *Great Western Mail Line* el Londono al *Bristol*, kaj en 2017 ĝia daŭrigo al *Cardiff* kaj *Swansea*. Sur la linio trafikis elektra trajno jam ekde la jaro 1994, nur sur 19 kilometroj el londona stacio *Paddington* al flughaveno *Heathrow*, kie estas ekspluatataj flughavenaj rapidtrajnoj.



Britio: **Unuafoje en Valeso**

La fervoja linio *Paddington – Bristol Temple Meads* tra stacioj *Didcot Parkway*, *Swindon* kaj *Bath* longas 190 km-jn. En *Bristol*, kie plej uzata estas trapaŝebla stacio *Temple Meads*, estas preparata situacio, ke la trajnoj el Londono post elektrizado finiĝos en malnova sakstacio, en memorprotektata historia kapstacio el jaro 1840, konstruita de la konstruisto *Brunel*. Temas pri la plej malnova kapstacio en la mondo, kiu de post la jaro 1965 ne estas trafikuzata, la trakaro estas malmuntita, kaj la relvoja tereno servas kiel parkadejo. Elektra trafiko aperos ne nur sur *Great Western Mail Line*, sed ankaŭ sur de ĝi deturnaj branĉlinioj. Temas ekzemple pri 27 km-jn longa linio *Reading – Newbury* aŭ *Cherwell Valley Line* en linioparto *Didcot Parkway – Oxford*. Elektra trajnoj aperos ankaŭ sur *South Wales Main Line*, konkrete sur linio el *Wootton Bassett* al *Swansea*. Por elektrizado estas planataj ankaŭ la linioj en ĉirkaŭaĵo de *Cardiff*, kiuj estos interligataj al linioj *South Wales Main Line*. Por Kimrio, kiu simile kiel Albanio aŭ Moldavio dume havas neniun elektrizitan fervojlinion, tio sendube fariĝos elstara okazaĵo.

Britio: Dum unu nokto kontaktlineo sur 1,6 km de linio

Kun elektrizo estas kunligita ankaŭ ekipaĵo de linioj pri nova sekurecaranĝaĵo, sed ankaŭ aĉeto de relveturiloj. Sur fervoja linio trafikos novaj trajnkompletoj kun nomindiko *Super Express*. Tiuj veturiloj de la firmao *Hitachi*, atingantaj maksimuman rapidon 225 km/h, estos ekipitaj de eŭropa sekursistemo *ETCS* nivelo 2. Por elektrizaj laboroj trafikisto de brita fervoja infrastrukturo, kompanio *Network Rail*, mendis de germana fabrikisto *Windhoff* specialan kombinaĵon por konstrulaboroj kun 23 veturiloj, kies prezo estos 35 milionojn da sterlingaj Pundoj. Oni atendas, ke skipoj da dungitoj de la speciala vagonaro povus en unu nokto komplete munti supertrakan kontaktlinion 1,6 km-jn longan, kompreneble antaŭe konstrue preparitan. Konstrulaboroj sur *Great Western Mail Line* povus komenciĝi jam en jaro 2013. La entutaj kostoj por la modernigo atingos ĉirkaŭ 5 miliardojn da sterlingaj Pundoj, en tiu estos enkalkulitaj la elektrizo, sekurecaranĝaĵo kaj ankaŭ relveturiloj.

Britio: En norda Anglio la elektrizado pli rapidas

La brita registaro en somero 2012 aldone aprobis sumon 4,2 miliardojn da sterlingaj Pundoj por plia modernigo de fervojaj linioj, kiu estas destinita por jaroj 2014 ĝis 2019. Nove estos elektrizitaj linioj, ekzemple *Basong-stoke – Reading*, *Oxford – Leamington – Coventry* aŭ *Oxford – Bedford*, kaj aliaj. En la norda parto de Anglio elektrizaj laboroj jam okazas, kaj en venontaj jaroj estos iom-post-iome finitaj. Temas pri la linioj *Manchester –*



Newton-le-Willows (fino estas planata en 2013), *Manchester – Liverpool* kaj *Huyton Wigan* (planata en 2014), kaj *Manchester –*



Preston – Blackpool (planata en jaro 2016). Al tio apartenas novaj elektrizaj projektoj *Crossrail* kaj *Thameslink* en londona regiono por jaro 2018.

Ĉiuj nove elektrizataj linioj funkcios je alternkurento 25 kV/50 Hz. La fakuloj asertas, ke temas pri baza rekonstruo de fervoja infrastrukturo, kiu en la lasta jardeko en Britio ne havas analogion. La financado estas dividita tiel, ke parto de la mono por konstruado estos prenata el plialtigitaj veturkostoj (pasaĝeroj), pri kio estis decidite jam en la jaro 2010, kaj plia parto de la rimedoj venos el ŝparitaj transportkostoj sur elektrizitaj linioj, nun surveturataj per termikmotora trakcio.

Ĉeĥio: Senobstakla veturilaro de Ĉeĥaj Fervojoj havas jam 537 veturilojn

En jaro 2012 la Ĉeĥaj Fervojoj plinombrigis sian veturilaron je rekorda nombro de novaj vagonoj sen obstakloj por handikapuloj. Nove aldoniĝis 83 kaj sume jam estas ekspluatataj 537 veturiloj. Tiaj pasaĝervagonoj aperas parte kiel modernigitaj pli malnovaj veturiloj ĝis nun kun tiaj obstakloj, parte per livero kaj entrafikigo de tute novaj

pasaĝervagonoj. En horaro 2013 estis aldonitaj ekzemple du novaj rapidtrajnaj senobstaklaj trajnparoj. La plej multajn tiajn veturilojn oni enkondukis en regiona trafiko.

Egiptio: **Metroo en Kairo ekspluatos sudkoreajn veturilojn**

Ŝtata oficejo por tuneloj en unua duono de januaro 2013 subskribis kontrakton en valoro 2,16 miliardojn da egiptaj Pundoj kun firmao *Hyundai Rotem* por liveri 20 naŭvagonajn klimatizatajn kombinaĵojn por metrolinio en Kairo. La interkonsento determinas, ke loke produktataj komponentoj prezentos almenaŭ 22 procentojn da komerca valoro. La kompanio *Hyundai Rotem* prizorgos bontenadon kaj riparojn de la vagonoj dum ok jaroj post fino de dujara responsa limtempo

Francio: **Batalo por krei holdingon de SNCF kaj RFF**

La franca registaro anoncis planon por kunligo de kompanioj *SNCF* (trafikisto) kaj *RFF* (administranto de infrastrukturo) tiel, ke ili komune formu holdingon kaj samtempe plenumu leĝdonon de EU. Laŭ la trafikministerio la nuntempa infrastrukturo ne estas funkcia, kaj la ŝuldoj de la trafika kompanio kreskas. Laŭ ĝia klarigo administracio de infrastrukturo estu plifortigota pri sekcio bontenado de veturilaro. Samtempe estos enkondukataj klaraj reguloj, laŭ kiuj estos eble destini prioritatojn por unuopaj trafikistoj. La plano antaŭvidas krome fondi kontrolkomitaton, kiu solvos eventualajn konfliktojn.

Hispanio: **Unua grandrapida fervojlinio transiras landlimon**

Komence de januaro 2013 Hispanio ovaciis finkonstruon de unua grandrapida linio, kunliganta Pirenean Duoninsulon kun aliaj eŭropaj landoj.

La projekto en valoro 3,7 miliardojn da Eŭroj kovris krom alie konstruon de 30 tuneloj kaj ekipadon per sistemo *ERTMS*. La konstruado de fervoja linio Madrido – Barcelono – *Figueras* estis grandparte dotita el fondusoj de Eŭropa Unio, el kiuj venis 3,44 miliardoj da Eŭroj.

Italio: **Financa subteno de EU por konstruo de tuneloj**

Eŭropa Unio donos financan subtenon de 10 milionoj da Eŭroj al du bazaj fervojaj infrastrukturaj projektoj en norda Italio. La projektoj helpas realigi fervoj-interligon el franca *Lyon* al ukraina landlimo. Tiu unua ricevos monsubtenon de 5 milionoj da Eŭroj, la monsumo estas destinita precipe por teknika ekipaĵo de Milana kontrola centro por linitraceo Torino – Milano – Verono – Padova. La dua itala projekto, kiu ricevos restantajn 5 milionojn da eŭroj, entenas konstruon de du tuneloj sur la menciita fervojlinio.

Svedio: **Debato pri verdaj vartrajnaj koridoroj**

En la unua duono de januaro 2013 en *Göteborg* okazis fina laborkunsido por projekto *Supergreen* (Superverda). La celo de la projekto estas subteni evoluigon de fervoja vartrafiko sur vojo, kiu estas favora por vivmedio. Ĉe la komenco de la pritraktata projekto estis aŭdeblaj antaŭtimaj voĉoj, ke la kriterioj pri respekto al vivmedio superos ekonomiajn postulojn. La rezulto de la fina studo elfluis en kompromison. Inter moderigaj konsiloj en la fino de la studo estas precipe alvoko al la Komisiono, ke ĝi daŭrigu pligrandigi la konkurenckapablon de la fervojo kaj direktiĝi je trafikdividaj koridoroj.

Preparis: Jindřich Tomášek



La stacidomo de la urbo Vác



La 66-a kongreso de IFEF okazos de la 17-a ĝis la 24-a de majo 2014 en Italio en la urbo San Benedetto del Tronto. Informojn kaj aliĝilojn oni povas ricevi de HFEA.